

Dialoga instrutekniko, 3-a parto
Claude Gacond, 323-a radioprelego, 1969.12.17 & 20

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La 7-an de septembro ni gvidis en Solothurn seminarion pri la dialogoj en la esperanto-instruado.

A.- En unua prelego, post klarigoj pri la avantaĝoj kaj limoj de tiu instru-tekniko, ni legis al vi la unuajn dialogojn, montrante, ke la novaj radikoj estas pgrade enkondukataj.

Cl.- Poste en dua prelego ni vidis, ke ekde la deka dialogo la lernantoj lernas lecionon post leciono teatraĵeton, en kiu la radikoj estas ĉiam pgrade enkondukitaj. Ni legis al vi la kvar unuajn dialogojn de tiu teatraĵeto, kiu metas la lernantojn en situacioj, kiujn ili renkontos en la esperantista vivo.

A.- Antaŭ ol legi al vi kelkajn aliajn dialogojn, ni prezentos al vi tiun gradigitan dialogaron.

Cl.- Ĝi estas verkita por 20-leciona kurso.

A.- Ekde la kvara leciono komenciĝas la teatraĵeto.

Cl.- Ĉiu leciono enkondukas inter 12 kaj 18 novajn radikojn. Tiuj novaj radikoj estas substrekitaj. En lingva parto oni trovas klarigojn pri ili. En tiuj klarigoj nur aperas jam renkontitaj radikoj.

A.- Komplemento donas la liston de la radikoj uzataj en la dialogoj.

Cl.- Entute aperas 375 radikoj en tiuj 20-paĝa dialogaro.

A.- Post ĉiu radiko cifero indikas, sur kiuj paĝoj oni povas retrovi la koncernan radikon. Tiel oni povas scii, en kiu dialogo ĝi aperis por la unua fojo, kaj en kiuj dialogoj ĝi estas reuzata. Tiu komplemento povas esti tre utila al la instruanto.

Cl.- Tiu dialogaro povas esti uzata cele al finkursa festeto. Ĉar lecionon post leciono la lernantoj devis taske lerni la ĵus studitan dialogon, ili baldaŭ parkere povas ludi sufiĉe longan teatraĵeton. Tiam, kiam oni alvenas al la 16-a leciono, se oni rimarkas entuziasmon ĉe la lernantoj, oni povas decidi pretigi festeton por la grupo.

A.- Tiu festeto povas permesi bonan kontakton kun la lokaj esperantistoj.

Cl.- Plie ĝi havas la avantaĝon devigi al kompleta parkerigo de ĉiuj dialogoj, do al bona posedo de tiuj bazaj frazoj, kiuj respondas al la situacioj, kiujn oni renkontas en esperantistaj kongresoj.

A.- Jen kelkaj pliaj dialogoj.

Cl.- En la dekkvara dialogo parolas Tom Bel kaj Marko Dika.

Tom Bel.- *Vi ne parolas, sinjoro Dika.*

A.- Marko Dika.- *Mi estas komencanto.*

Cl.- *Ĉu estas la unua fojo, ke vi partoprenas esperanto-kongreson ?*

A.- *Jes, sinjoro.*

Cl.- *Kiam vi komencis lerni esperanton ?*

A.- *Kiel oni diras « **il y a deux mois** » en esperanto ?*

Cl.- *Oni diras : antaŭ du monatoj.*

Dialoga instrutekniko, 3-a parto
Claude Gacond, 323-a radioprelego, 1969.12.17 & 20

A.- *Dankon ! Mi komencis lerni esperanton antaŭ du monatoj. Kiel oni diras « **manquer** » en esperanto ?*

Cl.- *Oni diras : manki.*

A.- *Ho, kiel en la franca ! Al mi mankas multaj vortoj.*

Cl.- *Jes, sed vi rapide lernos ilin. Baldaŭ vi facile parolos.*

A.- *Jes, mi esperas.*

Cl.- *Do, vi estas vera esperantisto.*

A.- *Ankoraŭ ne ! Mi estas nur esperanto.*

Cl.- Tiu dek kvara dialogo enkondukas 19 novajn radikojn. Kaj jen la dek kvina dialogo. Interparolas Julia Ĉagreno, Adela kaj Marko Dika.

Julia Ĉagreno:- *Ĉu ankaŭ vi estas komencantino ?*

A.- *Adela Dika.- Kion ŝi demandas ?*

Cl.- *Marko Dika.- Ŝi estas surda. Por paroli kun ŝi, vi devas kii.*

A.- *Kion ŝi demandis?*

Cl.- *Ŝi demandis, ĉu vi estas komencantino ?*

A.- *Kion vi diras ?*

Cl.- *Ŝi demandis, ĉi vi estas komencantino ?*

A.- *Kiu estas komencantino ?*

Cl.- *Ĉu vi estas komencantino ?*

A.- *Mi ne komprenas, ripetu !*

Cl.- *Ho, estas nenio grava !*

A.- *Kio estas grava ?*

Cl.- *Nenio.*

A.- *Mi nenion komprenas el via rakonto.*

Cl.- *Ankaŭ mi! Pardonu! Estas malfacile paroli kun surdulino. Kutime mi skribe parolas kun ŝi. Ŝi estas lerta esperantistino. Estas ŝi, kiu instruas al mi esperanton.*

A.- Tiu dek kvina dialogo enkondukas 15 novajn radikojn. Jen, por fini, la deksesta dialogo. En ĝi interparolas Maria Papilio, Ito Belamagazeno kaj Julo, Julia, Juliano kaj Julieta Pomfrit. Komika familio, kiel vi konstatos.

Cl.- *Maria Papilio.- Jen alvenas la familio Pomfrit kun sinjoro Ito Belamagazeno.*

Cl. kaj A.- *Bonan tagon, gesinjoroj ! Bonan tagon ! Ĉu vi bone aŭtomobilis ?*

Cl.- *Julo Pomfrit.- Jes, vere tre bone !*

A.- *Julia Pomfrit.- Tre bone, tre bone, ĉu vere, kun akcidento !*

A. kaj Cl.- *Ĉu kun akcidento ?*

Cl.- *Ito Belamagazeno.- Ni ĉiuj riskis morti !*

Cl. kaj A.- *Ĉu morti ?*

Dialoga instrutekniko, 3-a parto
Claude Gacond, 323-a radioprelego, 1969.12.17 & 20

Cl.- Juliano Pomfrit.- *Sed ni ne mortis. Kiel vi vidas, ni ĉiam estas vivantoj, ĉu ne ?*

A.- Julieta Pomfrit.- *Kaj vivantoj, kiuj soifas kaj malsatas.*

A. kaj Cl.- *Kaj la aŭtomobilo ?*

Cl.- Juliano Pomfrit.- *Ŝtono rompis ĝian antaŭan vitron.*

A.- Julieta Pomfrit.- *Kaj ni vidis nenion plu.*

Cl.- Juliano Pomfrit.- *Patro rapide faris truon.*

A.- Julieta Pomfrit.- *Kaj ni revidis.*

Cl.- Juliano Pomfrit.- *Patrino tre multe kriis.*

A.- Julieta Pomfrit.- *Ne nur patrino kriis. Ni ĉiuj kriis.*

Cl.- Juliano Pomfrit.- *Estis tre bela momento !*

A.- Julia Pomfrit.- *Ĉu vere ? Ho, la infanoj ! Por ili, akcidento estas « tre bela momento » !*

Cl.- Juliano Pomfrit.- *Sed, patrino, ni ne mortis. Estis nur tre tre malgranda, tre tre malgrava akcidento. Ni nur riskis morti.*

A.- Tiu dekseka dialogo enkondukis 20 novajn radikojn.

Cl.- Tiu gradigita dialogaro ne ankoraŭ estas aĉetebla. Unue ni deziras ĝin eksperimenti okaze de kelkaj esperanto-kursoj.

A.- Sed la radio-aŭskultantoj, kiujn tiuj tri prelegoj pri la dialoga tekniko en la esperanto-instruado interesis, povas ricevi tiujn tekstojn, kiujn ni multoblige eldonis. Ilin akompanas la listo de la 375 radikoj kaj metodologiaj notoj. Se vi deziras ricevi tiun dokumenton, skribu al Radio-Svislando.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-